




Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1984 - 1

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo

Kanado kaj Francio festas
la unuan esplorvojaĝon
de Jacques Cartier (1534)

La Pac-ideo en la Historio

F. Roose

Korkkverko en Portugalujo

S. Humm - A. Pereira

Humorajo

Paĝo de la geknaboj

Bœuf à la Stroganoff

F. Szilágyi

La krea verko renversita

H. Röllinger

Por via distro

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn orelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Jam en januaro ni ne plu povas disponigi al la aliĝantoj unupersonajn, eĉ familiajn ĉambrojn por la unua somera periodo. Denove ĉijare tiu periodo anonciĝas sukcesplena.

La dato mem, la komenciĝo de julio, estas oportuna, ĉar en preskaŭ ĉiuj landoj, almenaŭ de nia hemisfero, la homoj ferias. Taglumas pli longe ol en aŭgusto. Aĝrabla estas la vetero kaj belaj la floroj. La arboj povas ludi sian ŝirman rolon kontraŭ la suno. La temperaturo alvokas al ripozo. Sed ĉu nur la klimato allogas la aliĝantojn ?

Verŝajne ne. Ankaŭ la programo de tiu unua periodo. Ni preferis la sistemon de plurtema prelegaro ol tiun de nur unutema. Ni pensas (ĉu ni eraras ?), ke el la dekkvin aŭ pli da prelegoj prezentitaj certe ĉiu trovos sian plezuron aŭ « nutraĵon ». Ĝis nun ni konstatis, ke neniu ĉeestanto estis malkontenta pri la prezentitaj temoj. Kelkaj pli ŝatas tiun aŭ tiun ĉi, eĉ, eble, tute ne ŝatas iujn, se ne la temojn eventuale la prezentmanieron. Sed ili ĉiam povas doni sian kontraŭan opinion okaze de la posttagmeza diskutrondo. Alia pruvo de tiu intereso estas la fakto, ke diversaj Espervuoj en la mondo citas tiujn prelegojn aperintajn en Kulturaj Kajeroj.

Ankaŭ en 1984 ni estas certaj, ke plaĉos la plimulto el la proponitaj prelegoj. Sro Hugo Röllinger, kiu jam promenigis nin tra la tempo kaj la spaco, de la Minoà Kreto al la mortiga Poluso tra la islama arto kaj la ruĝa Maroko, prezentos en julio aliajn temojn. Vi povos konatiĝi kun « La Faŭno de l'Pratempo », « La Papilioj, flugantaj juveloj », « La unua Imperiestro de Ĉinio », « Tut-Ank-Amun », k.a. Ne ĉiujn preleĝtitolojn ni ricevis sed la ĉeestantoj povos aŭdi ankaŭ pri « Internacieco de arto kaj artistoj », « Tabua temo : prostitucio tra la jarcentoj ». Kompreneble aliaj preleĝontoj sin anoncis.

Krom la kutimaj tri kursoj ĉi jare okazos, dum la unua periodo, ankaŭ Seminario, gvidata de Sino Audrey Childs-Mee kaj kies temeroj estos : principoj de rektmetoda instruado de lingvoj ; teknikeroj de rektmetoda instruado de Esperanto ; instruado de la Gramatiko de Esperanto laŭ la rekta metodo.

Ĉu plaĉas al vi tiu programo de la unua periodo ? Iom tro densa ? Ne timu, ĉar Sino Cheverry gvidos vin al kaj tra vizitindaj lokoj ne tre konataj. Vi scias, ke vi povas fidi ŝin.

La respondeculoj de la Esperanto-Domo dankas ĉiujn siajn amikojn kiuj sendis al ili bondezirojn kaj kuraĝigojn okaze de la nova jaro. Ili petas pardonon, ke ili ne povas respondi al ĉiu aparte. Al ĉiuj ili deziras sanon, feliĉon kaj pacon.

Esperanto tra la Mondo



STUDTAGO PRI ESPERANTO EN PARIZA UNIVERSITATO

La 25-an de novembro 1983, okazis en la Universitato Paris VIII — Vincennes, studtago pri Esperanto. Proksimume 150 homoj aŭskultis dekojn da altnivelaj prelegoj, post interveno de tri konataj neesperantistaj lingvistoj, kiuj diris, kion ili opinias pri la Internacia Lingvo.

Entute, oni povas konsideri, ke tiu agado en universitata medio estis tre sukcesa. Estus tamen bone estonte provi antaŭe konigi tiajn studtagojn al la respondeculoj kaj en la sekretarioj de la prilingvaj kaj lingvistikaj fakultatoj de la provincaj universitatoj, kaj raportti poste en fakaj gazetoj.

Esperable cetere, kompetentaj esperantistaj profesoroj provos same agadi en aliaj lokoj.

FESTIVALO KANTO-TEATRO EN PARIZO

La postajn tagojn, 26/27-an de novembro, UFE aranĝis en Parizo la unuan festivalon « kanzono-teatro » por sufiĉe da spektantoj en ĉiu spektaklo.

Krom pluraj kanzonistoj kaj la kabareta trupo « La ruza kruĉo », oni povis aplaŭdi la teatrajn trupojn TESPA kaj LA KRIZALIDO.

TESPA prezentis « La juda edzino » de Brecht, « La advokato » de J. Cossin kaj originalan verkon de M. Duc-Goninaz « La ŝtona gasto » (laŭ Puŝkin).

La Krizalido prezentis « La evento » de G. Foissy kaj propagandan teatraĵon en franca lingvo pri Esperanto « Votre langue m'intéresse ».

KIAM NI LEGAS PRI ESPERANTO EN « LE MONDE »

En la numero de la 18-a de januaro 1984 aperis artikolo titolita « La krizo de UNESKO » en la konata pariza ĵurnalo « Le Monde ».

La aŭtoro inter alie skribis, ke la origina kulpo de la internacia sistemo kuŝas en tio, ke la Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO k.a. ne adoptis Esperanton en 1946 kaj poste, la aŭtoro parolas pri la grandegaj elspezoj pro la multlingveco en la organizaĵo.

Tiu artikolo instigis legantojn skribi kaj en la numero de la 7-a de februaro, sur la 2-a paĝo kaj sub la granda titolo « UNESKO kaj Esperanto », la ĵurnalo publikigis eltiraĵojn de leteroj (unu malfavora al Esperanto), kaj alportis aliajn detalojn pri la kosto de tradukoj kaj interpretado ĉe UNESKO.

La ĝenerala tono de la artikolo restis tre simpatia al Esperanto.

Por subteni tiun « favoran etoson », unu esperantisto poste sendis al la redakcejo la tekston de la rezolucio de UNESKO pri Esperanto, la tekston de la parolado de S-ro M'Bow en la kongreso en Rejkjavik kaj informon pri la statuto de UEA ĉe UNESKO.

OKAZOS ANKAŬ EN 1984

— Internacia renkontiĝo de ICEM (Kooperativa Instituto por Moderna Lernejo movado Freinet) en Langueberg (Moselle), Francujo 8/19-an de julio. Skribi al

Paul Poisson, 239, rue Victor-Hugo, Saint-Cyr-sur-Loire, 37100 TOURS.

— Internacia SAT-kongreso en Bordeaux 1/8/8.

Nacia franca kongreso en Bourges 8/12-an de junio (Pentekosto).

— SAT-amikara kongreso en Draguignan 21/24-an de aprilo (Pasko).

— Multaj studperiodoj dum la jaro en Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, Pf 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando).

— 8-a Internacia Junulara Festivalo 18/23-an de aprilo, San Giuliano Mare (Rimini). Temo : « La promesa lando » (pri futuro kaj utopio). Adreso por informo : IEJ — Itala Esperantista Junularo, Casella Postale 210, I-56100 Pisa Italujo.

— Esperanto-tendaro en « Insulo de Juneco » Obonjan apud Šibenik (Jugoslavujo) 23/30-an de julio. Skribi al IKS (por Insulo de Juneco) Amruŝeva 5/1, YU-41000 ZAGREB.

— Aranĝoj de la Naturamikoj (TANEF) :

Renkonto, verŝajne en septembro en Merano (Italujo) ;

Internacia Feriosemajno en « Dorf Tirol » (Italujo) 19/26-an de majo, temo : « Sekurigi la pluvivadon », kun kursoj, ekskursoj.

Informas : Erna Döring, pf 225, CH-4003 BASEL, Svislando.

— Markola kongreso 5/8-an de majo en Boulogne-sur-Mer. Informas : M.-J. Liné, 34, rue de Beaupaire F-62200 BOULOGNE-SUR-MER.

— Kongreso de Franca Katolika Esperanto-Asocio en Blois 4/7-an de majo. Informas : S-ro PONS Centre Hospitalier F-41016 BLOIS CEDEX.

NOVAJ LIBROJ

— « 7000 tagoj en Siberio » de K. Stajner el la kroata tradukis K. Barkovic. 495 paĝoj. Memorajo de jugoslava komunista kondukita en sovetan malliberejon, dum stalinismo.

— « Materada », romano de la itala vivanta verkisto Fulvio Tomizza, traduko de Pier Giorgio Sorano. Pri la deviga foriro de la itala malplimulto el la ĉelimaj regionoj de Jugoslavujo post la lasta mondmilito.

— « Sferoj 2 — Sciencfikcio kaj fantasto ». Dua tia kolekto de aŭtoroj el diversaj landoj (tradukajoj). 13 rakontoj.

— « Rekta pensado », de Evaldo Pauli. 152 p. Pri temo « eduko de infanoj ». La aŭtoro estas brazila profesoro pri filozofio.

— Du kursotekstoj de SUK (Someraj Universitataj Kursoj) : « Infanpsikologio » de Margarete Landmark kaj « Seksedukado kaj psikoterapio » de E. James Liebermann (integriĝo al mensa sano).

— « Rakontoj pri Afanti » kaj « Saĝo-sako ». Du libretoj eldonitaj en Ĉinujo. Popolaj rakontoj pri folkloraj herooj de diversaj aziaj etnoj.

— « Iluzioj ». La nova novela kolekto de la franca esperanta verkisto Lorjak.

— Du aliaj verkoj de Istvan Nemere, la aŭtoro de « La naŭa kanalo » : « La blinda birdo » (118 p.) kaj « La fermita urbo » (Sciencfikcia romano).

Kanado kaj Francio festas la unuan esplorvojaĝon de Jacques Cartier (1534)

De aprilo ĝis septembro, en Kanado kaj Francio, en Kebeko kaj en la urbo Sankta Malo okazos diversaj celebraj festoj : historiaj ekspozicioj, son- kaj lumspektakloj, koncertoj, ŝip-konkursoj. Dum la printempo kolektiĝos sur la rivero Sankta Laŭrenco la grandaj trejn-velŝipoj de deko da diversaj landoj. En aŭgusto kaj septembro kvindeko da katamaranoj konkurse transveturos Atlantikon.


Antaŭ 450 jaroj, la 21-an de aprilo 1534, la franca ŝipisto Jacques Cartier (Ĵak Kartie) forlasis sian naskiĝhavenurbon Sankta Malo sur sia ŝipo « La Grande Hermine » (La Granda Hermeno) direkte al la « novaj teroj ». Dek jarojn pli frue la florencana maristo Verrazano, komisiita de italaj bankistoj loĝantaj en Francio kaj de la franca reĝo Francisko 1-a, jam esploris la marbordon de Ameriko, de Florido ĝis Kabo Breton, serĉante, kiel multaj aliaj en tiu epoko, « la feliĉajn bordojn de Cathay (Hindio) ». Tie onidire troviĝis « amasoj de oro kaj aliaj riĉaĵoj ». Dank'al Verrazano naskiĝis Nova Gallia, lando aparta de Azio kaj Afriko. En 1534 la franca reĝo Francisko 1-a komisiis al Jacques Cartier veturi al tiuj « feliĉaj bordoj ». Okaze de tiu unua vojaĝo Jacques Cartier malkovris « internan maron », la nunan Golfon de Sankta Laŭrenco, vizi-

tis novan landon, konatiĝis kun enloĝantoj laŭdire venantaj de okcidento, hipotezis vojon irantan pli profunde enlanden kaj eblecojn de komercaj interŝanĝoj.

Okaze de dua vojaĝo, en 1535, Jacques Cartier malkovris la riveron Sankta Laŭrenco, kiu ebligis la esploradon de la lando ĝis la mezo de la kontinento kaj fariĝis poste la disvolvada akso de Kanado. Li tiam spertis la terure malvarman kanadan vintron kaj lernis de la enloĝantoj kiamaniere lukti kontraŭ skorbuto.

Lia lasta vojaĝo en 1541, kun Roberval, ne estis sukcesa pro malakordo inter la du viroj kaj sangaj bataloj kun la indiĝenoj. Fiaskis ankaŭ la revo pri riĉaĵoj. Reveninte en Francio Cartier konstatis, ke li plenigis la ŝipon per piritaĵoj kaj glimajoj anstataŭ oro kaj diamantoj !

Sed ne la malsukcesojn de Cartier memoros la celebrantoj de la 450-a datreveno de la unua esplorveturo de la maristo. Lia granda merito estas, ke li malkovris la riveron Sankta Laŭrenco, grandan vojon de penetrado en la kontinenton. Tiu malkovro estis la plej grava depost la vojaĝoj de Kolumbo. Ĝi ebligis la venon de Samuel de Champlain kaj la fondadon de la franca reĝa teritorio en Ameriko.



LA PAC-IDEO EN LA HISTORIO

La homaro ĉiam sopiris al paco. La homaro ĉiam militis. Kia paradokso! La kaŭzojn de tiu fenomeno ni ne serĉas en tiu ĉi artikolo. Same estis ĉiam homoj kaj komgrupoj, kiuj serĉis elirvojon el tiu infera cirklo. Ili kredis, ke per siaj sistemoj aŭ principoj aŭ agadoj la homaro fine trovos tiun pacon. Tie ĉi ni prezentas nur manplenen da tiaj klopodoj.

FARAONO AMENOFIS IV AŬ ECHN-ATON (14-a jc. a. K.)

En multaj lernolibroj pri historio li estas nomata « herezulo », ĉar li anstataŭigis la politeismon de la egipta pastraro per monoteismo. Nur unu sola Dio ekzistas, la suno. Interesa por nia temo estas, ke li konsideris tiun Dion la patro de ĉiuj kreitaĵoj, kiuj do estas ĉiuj gefratoj, tiel en la lando Egiptujo kiel en eksterlando. Do, tiuj fremdaj popoloj rajtas, same kiel la Egiptoj, havi sendependecon. Konsekvence li retiris la egiptajn armeojn el tiuj fremdaj landoj, tiel ke sub lia regado la egipta « mondregno » denove iĝis la limigita Egiptujo. Kia unika ekzemplo! Sed post lia morto la armeestroj kaj la pastraro sukcesis repreni la povon. Ili nuligis lian vivolaboron, persekutis lian religion, revenigis la egiptan popolon al la allogaj antaŭaj agadoj de konkerado.

LA ROMIA IMPERIO

(5-a jc. A. K. ĝis 5-a jc. p. K.)

Tiuj realismaj kaj praktikaj Romianoj havis principon laŭ kiu paco estas ebla nur se fortika povo kapablas subpremi ĉiam kontraŭromian agadon. De tio : « Se vi volas pacon, preparu kaj preparu vin al la milito ». Fortega romia imperio devas konstante organizi, ordigi la socion, protekti ĝin kontraŭ « barbaraj » popoloj. Romiaj politikaj estroj ege bone klarigis tion al ribelaj gentoj, per vortoj kaj per agoj. Fakte okazis tio, kion iuj inter ili antaŭvidis : tuj post la disfalo de la romia imperio venis jarcentoj da konstantaj militoj, kaj ruiniĝo de materia civilizo.

LA KRISTANISMO

La nova forto, kiu rekonstruis materian, spiritan kaj moralan civilizojn estis la kristanismo, kaj tutspeciala la ordeno de la Benediktanoj. En la temo, kiu priokupas nin estas ĝi, kiu bremsis la batalemon de la kastelsinjoroj. La eklezio malpermesis batalojn unue dum kelkaj tagoj, poste dum tutaj periodoj kiel la fastotempo kaj la advento (la kvar semajnoj antaŭ naskiĝo de Kristo). La monaĥoj sukcesis konvinki ne malmultajn kastelsinjorojn batali nur por protekti malfortulojn, nur por iu bona afero. Ĝi tiel kreis la kavaliridealon. De tio venas la bona famo de la esprimo « kavalira, kavalira ago. » Ĝi estis entute

grava kontribuo al pacigo de vastaj teritorioj dum iu tempodaŭro.

La eklezio havis ankaŭ siajn teoriulojn, kiuj do teorie progresigis la pac-ideon. Inter ili la plej granda estis Sankta Tomaso de Akvino (13-a jc.), la « doctor angelicus » (la anĝela instruanto), kies teologio estas ankoraŭ nun la oficiala instruado de la Rom-katolika eklezio. Li starigis tri kondiĉojn por pravigi militon : 1^o la alia partio estu tute, plene kulpa, ne parte kulpa. 2^o ĝi devas scii, ke ĝi estas kulpa. Kaj la tria kondiĉo estas, ke ĝi rifuzas ripari la kulpon. Tiuj tri kondiĉoj estas nepraj. Sen plenumo de eĉ unu, neniu milito estas pravigebla. Vi tuj komprenas, ke neniam tiuj kondiĉoj estas plenumitaj. Tiel okazis, ke post la mezepoko, en la multe malpli severa Renesanco, la doktrino ankaŭ malstriktiĝis. Kaj la 17 jarcenta hispana Jezuito Suarez instruis, ke nur parta kulpo de la alia pravigas jam militon.

Sed ni revenu ankoraŭ momenton al la malfrua mezepoko, al la 15-a jc. Regis en Anglujo Henriko la VI-a, kiu fine malvenkis en la « centjara milito » kontraŭ Francujo. Fakte li ne estis militohomo, militreĝo. Li ekhavis originalan ideon por certigi la mondpacon. Li starigis lernejon alireblan nur por filoj de reĝoj. Se tiuj reĝidoj iĝas amikoj dum la studotempo, ili poste sur la trono ne plu volos almiliti estintan studkamaradon. Ankaŭ tiu projekto fiaskis. Li ne pripensis, unue, ke estintaj amikoj povas poste iĝi malamikoj ; kaj due, ke reĝoj sur la trono ofte estas tre forte influataj de diversaj homoj, grupoj politikaj, ekonomiaj kaj aliaj. Nur lia fondaĵo restis : la Eton-College en Windsor.

Ni preterlasu la grandan pacifiston Erasmus kun liaj famaj « Dialogoj. » Ni preterlasu eĉ la 17 jarcentan nederlandan juriston Hugo de Groot (Grotius), kiu estas je la bazo de la internacia juro. Kaj ni ankaŭ preterlasu Kant, kiu en la verko « Al la eterna paco » rekomendas i. a. forpreni de la reĝoj la ĉiopovon. Kaj ni tuj priententu la kongreson de Vieno (1815) post la fina malvenko de Napoleono, por evidente vidi, ke paco ne estas ebla sen justeco. La diplomatoj volis tie restarigi la Eŭropon de antaŭ Napoleono kaj de antaŭ la franca revolucio, do de la « ancien régime » (la antaŭa reĝimo), kun ĉiuj antaŭaj sociaj, politikaj kaj aliaj maljustaĵoj. Bone konsciante, ke tio ne funkcios glate, ili ĵuris, ke kiam iu kolego renkontos ribelon, ili tuj venos helpi por subpremi la ribeladon. Tion ili nomis la « Granda Alianciĝo ». Tri regantoj inter ili, nome de Aŭstrujo, Prusujo kaj Rusujo, esperis povi sukcesi se ili almenaŭ regos por la bono de siaj subuloj. Tial ili promesis regi laŭ la sanktaj principoj de la Evangelio ; kaj nomis tiun akordiĝon la « Sankta Alianciĝo ». La sekvo ? Dum la tuta 19-a jc. nur militoj kaj ribeladoj kun kulminpunktoj en 1830 kaj 1848.

En tiu vasta kadro de la historio de la pacideo, ankaŭ D-ro Zamenhof okupas rimarkindan lokon. Ankaŭ li estis obsedata de tiu ideo, ke oni

nepre eltrovu rimedon kontraŭ tiuj eternaj interbataladoj, kiujn cetere li mem vidis en sia urbo. Laŭ li estas du ĉefaj kaŭzoj, tra la tuta historio, de la intergentaj bataloj : la diverslingveco kaj la diversaj religioj. Do li kreis neŭtralajn mondlingvon kaj mondreligion. En la unue nomita li sukcesis ; en tiu senco, ke Esperanto disvastiĝis tra la mondo. Rilate la duan, li havas ankoraŭ vere tre malmultajn adeptojn, kaj oni ne povas paroli pri movado komparebla al la lingva movado.

Por ne tro longigi la artikolon, ni pasu al la 20-a jc.

La amerika prezidento Wilson antaŭmetis, tuj post la unua mondmilito planon, kies efektiveco certigus la mondpacon. El la 14 punktoj menciitaj du por ke vi vidu, ke ĝi estis nerealisma plano. 1) Nova kaj justa disdivido de la kolonioj. Tio implicus, ke Anglujo cedus almenaŭ tri kvaronojn de sia koloniaro ; kaj Francujo certe la duonon. 2) Alia punkto estis, ke traktatoj inter registaroj ne plu estu sekretaj, ĉu militaj ĉu komercaj aŭ kiaj ajn. Tria ekzemplo : por ĉiuj ŝtatoj estu libera navigado sur ĉiuj maroj, markoloj k. s. (Tio implicus liberan navigadon ankaŭ por militŝipoj tra Dardaneoj, do ankaŭ por Rusujo). Fakte nur unu punkto estis realigata : starigo de « Ligo de Nacioj ». Ĝia ĉefa celo estis : senarmigo de la ŝtatoj. Kiom da ŝtatoj faris tion ? Unu : Danujo.

Federacia Eŭropo : kvankam la ideo ne estis tute nova, tamen ĝi ekhavis fortan eĥon pere de la agado de grafo Coudenhove-Calergi (Ĉeĥdevena nederlanda politikisto). Li konstatis, ke per la traktato de Versailles ekestis novaj ŝtatoj (Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo k. a.) kun siaj pliaj landlimoj, do kun novaj fontoj de konfliktoj ktp. Li klopodis konvinki ŝtatgvidantojn pri la neceso de federaciigo de Eŭropo. Li ne volis kunlaborigi popolamasojn. Tamen en ĉiuj ŝtatoj ekestis multnombraj pacifistaj movadoj. Regis ĝenerala kredo, ke kaŭze de tre forta internacia pacifista movado tiu mondmilito eble estos la lasta milito. Pro la fakto, ke ankaŭ la Esperanto-movado estis en sia celo internacipaciga, la publikaj kursoj konis grandan sukceson. Kursoj kun ĉirkaŭ 100 partoprenantoj, ankaŭ en malgrandaj urboj, ne estis esceptoj. Sekve de ĉiuj tiuj faktoroj ekestis interamikigo ; precipe inter Francujo kaj Germanujo. Ni citu la agadon de politikistoj kiel Aristide Briand, Stresemann, Rathenau kaj la agadon de francaj eksmilitintoj. Multegaj libroj, broŝuroj, revuoj propagandis pacifismon, kaj teorie kondamnis la militon sur bazoj de i. a. moralo. Unu libro, kiu iĝis preskaŭ la biblio de la teoria-morala pacifismo estas « Weltkirche und Weltfrieden » (Mondeklezio kaj mondpaco) de la germana dominikano Fr. Stratmann. Sed preskaŭ identaj kaŭzoj, kiuj eksplodigis la unuan mondmiliton ekminacis la mondon ekde 1930, kaj fine estigis duan mondmiliton. Kaj post tiu ankoraŭ pli terura milito, denove la plej granda de la historio, oni tamen ree devis rekonstrui ; kaj vole, nevole reрпиensi tiun ĉiam revenantan fenomenon de internaciaj militoj. Reekstaris politikistoj, kiuj dediĉis ĉiujn siajn fortojn por malebligi tiajn katastrofojn. Unu elsta-

ras, kiel nova Kristo, super ĉiuj : la mahatma (granda animo) Gandhi. Li volis sendependecon por sia lando, Hindujo, kaj sukcesis. Sed li predikis ankaŭ la metodon de neperforteco. Je iu momento li havis eble trionon de la hinda popolo kiel adeptaron. Sed li estis mortigita pro religiosa fanatismo. Kaj en tiu klopodo li fine malsukcesis. La bazo de lia teorio — kiun oni preskaŭ nenie legas — estas la jena : en ĉiu homo, ankaŭ en la plej malbona, plej malvirtigita, kuŝas io bona. Eble ĝi estas tre profunde kaŝita, pro ĉiaj okazintaĵoj en lia vivo. Tamen ĝi estas en li. Oni povas surfacigi tiu(j)n bona(j)n eco(j)n se oni faras je li nur amajn agojn. Verŝajne tio estas vera. Sed por tiel agi devus esti kvazaŭ perfektulo.

Ni volas fine citi alian homon : Robert Schumann, kiu kelkfoje ŝanĝiĝis je nacieco (Elzacano, kiu militis kontraŭ Francujo en la unua mondmilito, kaj kiu poste iĝis franca landa ministro !). Estas li, kiu, laŭ tuta verŝajneco, malebligis reajn militojn inter la okcidenteŭropaj ŝtatoj. Sed tio estas eble ankoraŭ ne historio, ja aktualaĵo.

PERSPEKTIVOJ ?

Okazas ankoraŭ ĉiutage militoj. Sed ĉu ankoraŭ okazos mondmilito ? Mi ne estas profeto. Du gravajn aferojn mi konstatas. 1) Se ni trarigardas la historion, ni vidas, ke la areoj, meze de kiuj ne plu okazas militoj, pligrandiĝas. Estis tempo dum kiu la urboj intermilitis. Poste, kiam la potenco de la grafoj pliiĝis, ne plu urboj sed grafolandoj intermilitis. Poste, kiam la povo de la reĝoj pliiĝis, ne plu feŭdaj landoj, sed reĝlandoj intermilitis. Nun parto de Eŭropo estas sur vojo al unuiĝo ; eble aliaj sekvos. 2) Pro la progresoj de tekniko kaj vojaĝeblecoj, la homoj vizitas ne nur aliajn landojn, sed ankaŭ aliajn kontinentojn. Ili pli kaj pli interkonatiĝas. Tio kreas novan etoson, mondvanan etoson. Mi scias, ke grandaj surfacoj de la tero ne jam partoprenas tion. Sed ĝenerale oni kredas, ke ni iras al iu mondkulturo kaj mondcivilizo. Tiu fenomeno estas esperiga. Ĝi certe ankoraŭ ne estas garantio. Sed ĝi progresu, dum mondkatastrofo ne jam okazas. Ĝi estas plia forta kialo por disvastigi niajn lingvon kaj movadon.

D-ro Fernand ROOSE, Brugge
el prelego prezentita en Grésillon.

FONDUSO BELBONA ESPERO

Se iu junulo aŭ junulino 16 ĝis 25-jara de via grupo deziras ĉeesti studperiodon en la Kultura Esperanto-Domo Grésillon, la fonduso Belbona-Espero povas helpi lin (aŭ ŝin) plenumi sian deziron.

Kandidatiĝoj (nomo, profesio, adreso, aĝo) al :

Esperanto-Domo Grésillon
49150 Baugé Francio

KORKKVERKO EN PORTUGALUJO

Teksto de la prelego prezentita de Augusto Pereira dum la federacia kongreso en Avignon, en Aprilo 1983.

La teksto rezultas el la kunlaborado de S. Humm kaj A. Pereira, specialisto pri korkkverko en Portugalujo. Akompanis la prelegon multaj diapozitivoj.

La korkkverko estas mediteranea arbo, sed la atlantikaj fasadoj de Maroko kaj ĉefe ibera duoninsulo estas al ĝi tre favoraj. Fakte, tiu arbo estas tre postulema pri grundaj kondiĉoj kaj samtempe pri klimato : acida grundo, ĉu sabla, ĉu sabloŝtona, ĉu granita, taŭgas al ĝi, tial oni trovas ĝin en Korsikujo, Sardlando, Balearoj, kaj ankaŭ en Provenco, en Maŭra kaj Esterela regionoj.

Pri klimato, ĝi timas malvarmon, kaj ne plu kreskas se la temperaturo falas sub 5 gradoj ; tial ĝi kreskas nur sub la 44-a norda paralelo. Krome estas necesa al ĝi iu malsekeco, kio klarigas ke insuloj, marbordo de varmaj landoj tre taŭgas al ĝi ; sub 400 mm da pluvo, ĝi ne plu kreskas.


Tiel, la korkkverko trovis ĉiujn favorajn kondiĉojn kunigitajn en regiono de Portugalujo nomita Alentejo, kiu vere estas ĝia privilegia kampo. Portugalujo havas la unuan rangon en la mondo, kaj pri la surfaco okupita de tiu arbo, kaj pri la produkto de korko mem ; tiu lando produktas

pli ol 50 % el la tutmonda korko. Sekvas Hispanujo, Alĝerio, Maroko, Francujo, Italujo, Tunizio por multe pli malgrandaj kvantoj. Usono kaj Sovetunio aĉetis glanojn por aklimatizi la korkkverkon en siajn landojn, sed sen granda sukceso.

Ekde la plej malnovaj tempoj, la korkkverko spontane kreskis : oni scias, ke Romianoj jam uzis korkon kiel ŝtopilojn de siaj ujoj, kaj oni havas pruvon, ke korkkverko ekzistis en Ĉinujo, jam 3000 jarojn a. K. Tre granda nombro da specoj de korkkverkoj ekzistas, verŝajne tia diverseco estas ligita al la florfekundigo, ĉar tiu arbo havas du malsimilajn florojn, la virseksan kaj la inseksan, kaj la diversaj specoj devenas el malsimilaj polenoj.

Kompreneble, ĉiuj scias, ke la korkkverko spontane multobliĝas per la ĝermado de glanoj, sed homo klopodis plibonigi la multobligadon per selektitaj glanoj, kiujn oni ĝermigas ĉu en terpotoj, ĉu en lignaj kestetoj ; poste, junajn arbojn oni plantas en specialaj plantovartejoj. Oni povas multobligi korkkverkon ankaŭ per splitoj de radikoj kaj junaj tigoj kiel olivarbon.

Oni konstatas, ke en sia natura medio, la korkkverko amike kunvivas kun la verda kverko, kaŝtano kaj ankaŭ karobaro, sed la proksimeco de pinarboj malebligas ĝian normalan kreskadon ; krome, ĝi tute ne ŝatas la najbarecon de eŭkalipto, kiu, tamen, kreskas en tute similaj kondiĉoj kiel ĝi.



Naturaj regionoj favoraj al korkkverko

Fine de la 19-a jc. kaj komence de la 20-a, kelkaj terposedantoj interesiĝis pri kulturado de korkkverkoj. Ili plugigis vastajn terenojn, plantigis longegajn vicojn de vitoj, kaj meze de ili, laŭ 10-metraj spacoj, junajn korkkverkojn. Vitoj ekdonis profiton post 3-4 jaroj, kaj garantiis vin-produktadon dum 25-30 jaroj. Kiam tiu kulturo ekkadukiĝis, la korkkverkoj, kiuj bone kreskis, donis unuan rikolton de korko. Ekzemple, en la regiono de Montijo, en grandega bieno, korkkverkoj kovras 3600 hektarojn, kaj ĉiujare oni rikoltas el ili 500 000 tunojn da korko.

Oni devas pritondi la arbojn, ĉefe por liberigi la trunkon, el kiu oni demetas la korkŝelon, kaj ankaŭ por aerumi la kapon de l'arbo. Mallerta aŭ troa pritondado povas difekti arbon por ĉiam. En bonaj kondiĉoj, korkkverko ekdonas korkon en la proksimuma aĝo de 20-25 jaroj; la maksimuma produktado okazas, kiam arbo estas inter 60 kaj 100-120-jara. Poste ĝi daŭre vivas sed post 150-200 jaroj arbo perdas sian ekonomian valoron, ĉar la produktita korko estas malpli bona laŭ dikeco kaj kvalito. Kelkfoje okazas, ke « kadukuloj » daŭre donas bonan korkon, tiel iu korkkverko produktis 1800 kg en unu rikolto, kaj sur ĝi laboris samtempe 20 laboristoj. Maljuna korkkverko, al kiu oni atribuis aĝon de 300 jaroj produktis 1230 kg en 1948.

La rikoltado de korko okazas en somero, kiam la ŝelo facile degluiĝas de la trunko; junio kaj julio tre bone taŭgas por tiu laboro, sed pro manko de laboristoj, oni komencas ofte fine de majo kaj daŭrigas en aŭgusto, eĉ en septembro. La somera varmego kaj la ruĝnigraj formikoj, kiuj vivas sur kverkoj, estas du teruraj ĝenoj por la kork-rikoltistoj. Oni rikoltas korkon per akra hakilo, sed la rikoltisto devas esti lerta por ne vundi la arbon.

Sed, kio estas korko?

Ĝi estas la ŝelo de tiu speco de kverko, sed verdire ĝi estas histo de mortintaj ĉeloj. Ju pli la trunko dikiĝas, des pli la ŝelo rompiĝas, kio klarigas la profundajn sulkojn, kiuj vidiĝas laŭ vertikalaj linioj. Se korko ne estus mortintaj ĉeloj, la naturaj fendoj estus ŝtopitaj de novaj vivantaj ĉeloj.

Laŭ leĝo, kiu protektas la korkkverkon en Portugalujo, oni rikoltas korkon nur ĉiun naŭan jaron: ekz. sur arbo, kiu donis korkon en 1983, oni ne plu rikoltos antaŭ 1992. La unuan demetitan korkon oni nomas « virga » korko (rikoltita sur 1,20 metra alteco). 9 jarojn poste, oni rikoltas la « duan » plus iomete da « virga »; 9 jarojn poste, oni demetas la « trian » nomitan « amadia » plus pecon da dua kaj pecon da « virga » k.t.p. Laŭ la opinio de specialisto la « dua » korko estas la plej bona por la fabrikado de korkŝtopiloj.

Oni lasas surloke la rikoltitajn korkplatojn por bona sekigado, poste oni transportas la rikolton per ŝarĝaŭtoj aŭ traktoroj, sed antaŭe, atentu la ŝtelistojn!

Korko delonge estas konata kiel la plej bona materialo por ŝtopi botelojn de ĉiuj vinoj en la tuta mondo. Fakte, ĝi estas pura, fleksebla, lasas

nek odoron, nek giston al la trinkaĵo; krome ŝajnas, ke neniam ĝi kapablas difekti ĝin. La korkindustrio komenciĝis en Portugalujo en la pasinta jarcento dank' al Hispanoj, Katalunoj, kiuj starigis malgrandajn fabrikojn en alenteja urbeto: Azarujo, proksime al Evora. Nun, grandaj kaj modernaj fabrikoj ekspluatas ĉiujn eblecojn por uzi korkon; ŝtopilojn por vinboteloj oni produktas ĉefe en la regiono de Porto: ĉiutage, milionoj kaj milionoj da diversaj ŝtopiloj estas produktitaj, kaj ankaŭ diversaj objektoj.

Kiam korko estas tre pora, ĝi estas senvalora por ŝtopiloj; oni granuligas ĝin kaj premiigas en alttemperaturaj fornoj por fari platojn uzitajn ĉefe por izolado.

La plej grandan kvanton de produktita korkaĵo en Portugalujo oni eksportas en la tutan mondon. Malgraŭ tio, la korkindustrio baraktas en malfacilaĵoj pro manko da mono. Kapitalo de tiu industrio estas plejparte eksterlanda (angla, usona, germana, franca) sed bankoj ne plu estas sufiĉe favoraj kaj kredito estas tre multekosta.

Ĉu Portugalujo scios konservi kaj ekspluati tiun riĉaĵon, kiun la naturon donacis al ĝi?

S. Humm — A. Pereira.

HUMORAĴO

La ĉaso de Sinjoro Grafo:

Ĉasisto plurfoje estis invitita de maljuna Grafo, unu el siaj amikoj. Fine li akceptis la inviton. Ĉar Sinjoro Grafo forestas, estas la gardisto, kiu kondukas la inviton tra ebenaĵoj kaj boskoj.

Je kelkaj centpaŝoj, belega perdriko brue forflugas: la ĉasisto levas sian pafilon... sed la gardisto mallevas ĝin, dirante: « Estas Karolina la perdriko de Sinjoro Grafo. Sinjoro Grafo neniam ĝin pafas! »

Oni daŭrigas la iradon. Subite forkuras belega leporo; tuj la pafilo estas alŝultrigita. La gardisto mallevas la pafilon kaj diras: « Estas Viktoro, la leporo de Sinjoro Grafo. Sinjoro Grafo neniam ĝin pafas! »

Iom pli malproksime la ĉasisto ekflugigas el heĝo nemankeblan tetraon... kiun li tuj ekpafos... Sed la gardisto mallevas la pafilon kaj diras: « Estas Antonio la tetrao de Sinjoro Grafo. Sinjoro Grafo neniam ĝin pafas! »

La ĉasisto, kvankam iom incitita, nenion diras kaj daŭrigas la promenadon. Subite el bosko eksaltas belege kapvestita kapreolo. Nia ĉasisto... ne levas la pafilon kaj diras « Sendube estas Julo, la kapreolo de Sinjoro Grafo! »

— Efektive, respondas la gardisto, estas Julo, la kapreolo de Sinjoro Grafo. Sed, kial vi ne ĝin pafis? Sinjoro Grafo ĉiam ĝin pafas!

PAĜO DE LA GEKNABOJ

PROMENO EN MALLUMO

Ni daŭrigas nian promenadon en la mallumo. Tricky, nia falanĝero, dormas en sia truo en arbotrunko. Ni adiaŭis lin kaj deziris al li 'bonan dormon'.

Je mallonga distanco ni aŭdas delikatan tuson; alproksimiĝas mallaŭta « pum! pum! ». Estas Valtero la Valabio. Li estas malgranda kanguruo. Lia ruĝeta nazo esploras la aeron, per nia odoro li rekonas nin. Du etaj manoj komencas esplori miajn poŝojn.

Klare, li diras : « Ĉu vi havas ion por mi ? » — kompreneble ne per vortoj, sed per tiuj esplorantaj manoj.

Li trovas pomon. Li tenas tion per ambaŭ manoj kaj mordas pecon. Mi frotas al li la orelojn, kaj li frotas sian kapon kontraŭ mian pantalonon.



Li venas kun ni per mallongaj saltoj. Se urĝas li povas salti pli ol kvar metrojn : tamen, ne urĝas. Li scias, ke li estas inter amikoj.

Ĉe la pordego de la ĝardeno, li sin turnas kaj foriras per mallongaj saltoj.

Li scias, ke oni ne permesas al li eniri la ĝardenon.

Lia plej ŝatata nutraĵo estas la ŝelo de roz-arboj, kaj pro tio li estas ne-bonvena en la ĝardeno.

Nun la orienta ĉielo ruĝiĝas.

Venas, la tago, kaj ni estas denove ĉe-hejme.

Onklo Wre el Aŭstralio.

LA FESTA SEZONO KOMENCIĜAS !

Estas la mezo de novembro. Ĉie tie, en Nederlando, ni atendas tre gravan gaston. Ĉiujare, en la mezo de novembro, Sankta Nikolao venas al Nederlando el sia hejmo en Hispanio. Li venas per vapor-ŝipo, kaj kun li venas multaj nigraj helpantoj. Ĉiu nigra helpanto nomiĝas 'Nigra Petro'. La Nigraj Petroj portas grandajn sakojn plenajn je spicaj kuketoj, 'Pepernoten'. Ili estas malgrandaj kaj rondaj kiel buletoj. La spic-kukuletojn la Nigraj Petroj donas al la multaj infanoj, kiuj atendas sur la kajo por diri 'Bonvenon' al Sankta Nikolao.

Sur la kajo atendas la Sanktulon ankaŭ bela, blanka ĉevalo. Per la ĉevalo Sankta Nikolao iras tra la stratoj, kaj la Nigraj Petroj iras kun li. Kelkaj iras per ĉevaloj, kelkaj iras per piedoj kaj kelkaj per bicikloj. Al ĉiuj infanoj, kiujn ili vidas laŭ la vojo ili donas la spic-kukuletojn, kiuj nomiĝas 'Pepernoten'.

Dum la nokto de la 5a - 6a de decembro, Sankta Nikolao, kun la Nigraj Petroj, rajdas la ĉevalojn sur la domo-tegmentoj. La ĉefa Nigra Petro havas grandan libron, en kiu estas la nomoj de ĉiuj infanoj en la lando. La aliaj Nigraj Petroj havas grandajn sakojn plenajn je donacoj por la bonaj infanoj. La donacojn ili sendas al la infanoj tra la kamen-tubo !

Feliĉajn festotagojn al vi ĉiuj !

AUDREY.



Bœuf à la Stroganoff

Mi volas komenci iom teorie. Temos pri la lingvo. Kio estas lingvo? Ĉiukaze interkomprenigilo, socia fenomeno, entute io ne kunnas-kita sed encerbumita iom post iom. Nu, tion vi scias. Esperantistoj uzas esperanton kaj sekve ankaŭ gepatran lingvon iom pli konscie ol la cetera parto de la homaro, kiu, bedaŭrinde, estas grave, superas nian nombron.

Ni diras, ke Esperanto estas facila lingvo, ĝin fundamentas logiko, almenaŭ pli granda logiko ol la aliajn lingvojn kaj pri tio ne estas duboj. Sed ni ne troigu la akcenton, kiam ni parolas pri logiko, ĉar homa lingvo ne kapablas esti tute logika, kiel la homo mem prezentas mikroskope malgrandan porcion da logiko en la vivo. Nun estus tre oportune iom aromigi tiun ĉi eldiron per ekzemploj prenitaj el la vortoj kaj faroj de niaj plej modernaj ŝtatviroj kaj el la okazaĵoj de la plej freŝa mondhistorio, sed mi retrudas min al la temo kaj silentas pri tiuj lastaj, kio cetere estas la plej prudenta maniero en tempestaj tempoj de la homa vivo. Ĉar mi ne volas esei, mi eĉ ne ilustras la logikajn mis-saltojn de la lingvo, de ĉiu lingvo, inkl. Esperanton. Mi konstatos nur, ke la mallongaj ŝercoj tre ofte ĉerpas el la fakto, ke la lingvo ne estas matematiko, ĝi ne estas filino de la severa logiko. Nu jen la promesita ŝerco.

Kliento en la administracio de gazeto : « Bonvolu diri al mi, kiom kostas funebra anonco ».

Kontoristino : « Po 20 centimoj por unu milimetro ».

Kliento : « Estas terure. Mia onklo, kiu ĵus mortis, estis preskaŭ du metrojn alta ».

La rolo de Esperanto? Se oni povas diri rajte, ke Esperanto estas facila lingvo, ĝia rolo tamen ne estas facila. Ĝi devas krei ordon inter tiuj mallogikaĵoj, kiujn la diversaj naciaj lingvoj kreis al siaj uzantoj. Se mi diras, laŭ hungara lingvosento, ke mi amas la edzinon de generalo N., ĉar ŝi estas bela kaj bona, svedoj perceptas tiun ĉi senton iom tragedie. Generalo N. do ne devas dueli kun mi pro tiu frazo, aŭ almenaŭ ne nepre. Se mi diras esperantlingve denove laŭ la hungara lingvosento al sveda sinjorino « Hodiaŭ vi aspektas bone », mi volas diri, ke

ŝi aspektas tre sana hodiaŭ, sed devas esti io en la frazo, kiu diras al ŝi ion alian, ĉar ŝia vizaĝo sereniĝas, alrigardas vin afable kaj diras : « Dankon, dankon, vi estas tre afabla ». Poste oni sciiĝas, ke la responda sveda frazo signifas : « Vi estas tre bela hodiaŭ ! »

Nu tiujn ekzemplojn oni povus daŭrigi ĝis morgaŭ matene. Sed vin interesas ĉu oni do ne okupu sin pri Esperanto? Male ĝuste por pli facile atingi kaj utiligi la sekretojn de aliaj lingvoj kaj aliaj homgrupoj, oni uzu relative facilan kaj relative pli logikan, malpli anarkian lingvon.

Oni demandas, kio direktas la lingvon. Ĝi ne naskiĝas kun la homo, sed ĝi kreskas kiel ĝi volas, ĉu ne? Ne tion, ni tamen ne diris. La lingvo ne estas logiko, sed ĝi estas faraĵo de la homo, aŭ pli ĝuste, ĝi estas iaspeca interkonsento, ke iu signo, gesto, vorto signifos ion definitivan inter homoj. Antaŭ 50 jaroj sub la nocio « radio » oni komprenis unuavice emanadon de la suno, nuntempe laŭ interkonsento, ion tute alian. Kelkfoje tia procezo estas longa. Iam la vorto « idioto » signifis en Greklando privatulon, t.e. ne ŝtatoficiston; sed ĉar la ŝtatoficistoj estis la plej inteligenta tavolo de la socio, la vorto « idioto » perdis el sia digno kaj iom post iom atingis sian nunan signifon, kun la beno de la interkonsentintoj.

Nun fine mi volas klarigi, kial ĉi somera babilado pri lingvoj havas super si la titolon : « Bœuf à la Stroganoff ». Tiu-ĉi kuirartaĵo donas titolon al la plej rapida evoluo de lingva interkonsento, kiu iam okazis en la mondo.

Mi vizitis la ĉefurbon Tallinn. Tio okazis antaŭ la dua mondmilito. Mi pasigis ravan semajnon en la pitoreska, romantika kaj bela estona urbo. Mi ankoraŭ vidas antaŭ mi la rondajn bastionojn de la urbo, la malnovajn stratojn, mi vidas florojn, sin balancantajn en la mara vento kaj... ritme irantajn sur la malnovaj stratoj kun ridetantaj vizaĝoj. Junajn florojn! Kompreneble mia fantazio flugigas min reen en la tempo kaj krom tio helpas estona bild-almanako, kiun mi ricevis pasintjare. Ĝi povus min konvinki, ke oni povas ankoraŭ nun retrovi la saman agordon, la samajn florojn en la antikva estona ĉefurbo, sed eble estus pli malfacile retrovi mian malnovan memon, kiu mi estis.

Tallinn havis tre viglan esperanto-vivon. Mi rimarkas ke preskaŭ ĉiu frazo donas novan temon pri aparta rakonto. Oni povis ferii en tiu urbo kaj ĝui la eksterordinaran medion, vivi en sovaĝe fremdlingva urbo gaje glate, malmultekoste, dank'al Esperanto. Se mi ne eraras, mi pasigis en du partoj dek tagojn en la urbo. Dum la unuaj du tagoj bonvolaj esperantistoj gvidis min kaj rekomendis al mi iajn manĝejoj, kie oni povis manĝi bonege kaj laŭ la sveda valuto ege malmultekoste. La trian tagon mi decidis memstarigi min. (Mia sekreta revoco estis ĉiam alveni en « inkognito » kaj iom post iom akiri al mi societon en fremda urbo. Pri tio mi ne sukcesis en Tallinn, sed fine mi volis gvidi mem mian propran « ekspedicion » en la estona vivbaro). Mi do adiaŭis miajn amikojn en la Esperanto-grupejo kaj iutagmeze mi eniris la jam konatan manĝejon. Afabla kelnero salutis min : « Tere » li diris, kaj mi respondis per la sama vorto. Pli frue estis alia kelnero, estis kelnerino la unuan fojon, sed egale ; mia tasko estis nur montri al mi mem, ke mi taŭgas kiel vojaĝspertulo. Mi ricevis la menukarton, diris « Tanan » (dankon) kaj komencis studi la karton kun fakeca vizaĝesprimo. Mi komprenis nenion. Mi ne sciis, kio estas kio kaj laŭ miaj pli fruaj spertoj estis danĝere fingromontri iun manĝaĵon. (Laŭdire okazis iam pri iu, ke post tia fingromontrado la kelnero diris : « Tion mi ne povas nun alporti al vi, sinjoro, ĉar ĝuste nun ludas ĝin la orkestro »). Tiam mi rimarkis nomon : « Bœuf à la Stroganoff », kiu certe estis ia bovaĵo. Mi mendis, ricevis kaj manĝis ĝin kaj estis kontenta eĉ post la pago, ĉar, kiel dirite, ĉio estis mirinde malmultekosta en Estonio.

La sekvan tagon mi reiris al la sama restoracio, aŭ pli ĝuste bonkvalita manĝejo ; min akceptis ridetante la sama kelnero ; mi rigardis la manĝokarton, kie denove nur la « Stroganoff » estis komprenebla. Desplie ĉar, kiel klariĝis, la kelnero parolis nur la rusan lingvon krom la estonan, kiuj du lingvoj ne apartenis al miaj specialaĵoj. Mi ricevis la saman bongustan manĝaĵon.

La tria tagon mi venis en la manĝejon, la atentema kelnero alrigardis min kaj diris afable : « Jah ! Stroganoff ». Kaj antaŭ ol mi vekiĝis el mia surprizo, mi ricevis la trian Stroga-

noff de mia vivo, kio ne estis malbona, sed mi komencis tamen kun iom frosta indigniĝo pensi pri la rusa generalo, kiu donis sian nomon al la malfeliĉa bovo trafinta mian tablon. Nu, estis la lasta Stroganoff de mia vivo. Sed la manĝaĵo, la deserto kiun mi tamen sukcesis ricevi, estis bonaj kaj...

... mi alvenis ankaŭ la kvaran tagmezon tien. La kelnero staris ĉe la pordo de la kuirejo. Mi ne diris eĉ unu vorton, ĉar mi ne havis tempon por tio. Ankaŭ li ne diris unu vorton, sed alridis min, jes-gestis per la kapo kaj ... alportis la kvaran Stroganoff de mia vivo. Ĝi estis ankaŭ la lasta, ĉar neniam plu mi vizitis la manĝejon. Sed se mi estus veninta kiam ajn, tiu kapmovado estus signifinta : « Jen Bœuf à la Stroganoff al vi, strangulo ! »

Tio estis la plej rapida (kvankam ne sufiĉe bone finiĝinta) interkonsento pri la elformado de lingva elemento inter du homoj en Tallinn ; eble eĉ en la tuta mondo, pri kiu, malgraŭ la timiga fino, mi rememoras kun iom da melanĉolio. Eble ie mi mendos denove Bœuf à la Stroganoff.

Verkis por Kulturaj Kajeroj

F. Szilágyi.

KOMUNIKAĴO DE LA ESPERANTO-DOMO

Legante nian programon por la jaro 1984, kelkaj amikoj estis surprizitaj ĉar la titolo de la tria somera periodo estas « Esperanto per Slojdo », kaj tiu vorto « slojdo » ne apartenas al la kutima ĉiutaga vorttrezoro. La difino estas facile trovebla en PIV : « Metia manlaboro, enkondukita en multaj lernejoj kun la celo ĝenerale eduki la personecon de la lernantoj ». Bela programo, ĉu ne ? Despli, ke ĝi estos gvidata de spertuloj, profesiuloj. Sed tio ne signifas, ke vi « slojdumos » de la vekiĝo ĝis la enlitiĝo. Vi ankaŭ povos ĉeesti kursojn, ekskursi, distriĝi, eĉ... ripozi. Ni nun estas certaj, ke la vorto « slojdo » fariĝis alloga kaj promesplena.

LA KREA VERKO RENVERSITA ĜIA PEREO

DE PROF. KONRAD LORENZ, NOBEL-PREMIITO

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron

Sed post multaj jarmilionoj fine la homo estis sufiĉe prudenta. Li diris : « Kiu jen parolas pri Dio ? Mi propramane de nun majstros mian futuron ». Li majstris, kaj komenciĝis la lastaj 7 tagoj de la Tero.

En la mateno de la unua tago

Decidis la homo esti libera, bona, bela kaj feliĉa. Ne plu esti similulo al Dio, sed homo. Kaj ĉar li devis kredi je io, li kredis je la libereco kaj je la feliĉo, je nombroj kaj kvantoj, je la burso kaj je la progreso, je la planado kaj je sia sekureco. Ĉar por sia sekureco li estis pleniginta la grundon sub siaj piedoj per raketoj kaj atomaj eksplodkapoj.

En la dua tago

La fiŝoj mortis en la industria akvoj, la birdoj mortis pro la ĥemifabrika pulvoro, kiu estis destinata por la raŭpoj, la leporoj mortis pro la plumbaj nuboj venantaj de la stratoj, la hundoj mortis dorlotitaj pro la bela ruĝa koloro de la kolbasoj, la haringoj pro la nafto sur la maro kaj pro la rubaĵo sur la fundo de la oceano. Ĉar la rubaĵo estis radioaktiva.

En la tria tago

Velkis la herboj sur la kampoj kaj la foliaro kaj la pingloj sur la arboj, kaj la musko kaj la likenoj sur la rokoj kaj la floroj en la ĝardenoj, ĉar la homoj faris mem la veteron kaj distribuis laŭ preciza plano. Estis nur eta eraro en la komputoro, kiu distribuis la pluvon. Kiam ili trovis la kaŭzon de la eraro, la pramoj kuŝis sur la seka grundo de Rejno.

En la kvara tago

Pereis tri el la kvar miliardoj da homoj — la unuaj pro la malsanoj, kiujn estis bredintaj la homoj ; ĉar iu estis forgesinta fermi la kanistojn, kiuj estis pretaj por la venonta milito.

Kaj iliaj medikamentoj ne helpis. Ĉi tiuj jam delonge efikis en haŭtkremaĵoj kaj porkaj lum-betoj. La aliaj homoj mortis pro malsato, ĉar kelkaj el ili estis kaŝintaj la ŝlosilon por la greanaj provizejoj.

Kaj ili malbenis Dion, kiu ja ŝuldis al ili feliĉon. Li ja estis la adorata Dio.

En la kvina tago

La homoj premis la ruĝan butonon, ĉar ili sentis sin minacataj. Fajro ĉirkaŭvolvis la terglobo ; brulis la montoj, vaporigis la maroj, kaj la betonskeletoj en la urboj fariĝis nigraj kaj fumis. Kaj la anĝeloj en la ĉielo vidis, ke la Blua Planedo iĝis ruĝa, poste aĉe bruna kaj fine cindro-griza. Kaj ili interrompis sian kantadon dum dek minutoj.

En la sesa tago

Estingiĝis la lumo. Polvo kaj cindro vualumis kaj kaŝis la sunon, la lunon kaj la astrojn. Kaj la lasta blato, kiu estis postvivinta en raketa bunkro, pereis pro la troa varmeco, kiu ne konvenis laŭsane al ĝi.

En la sepa tago

Estis silento. Fine. La tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismaj ŝiroj kaj fendoj, kiuj estis formiĝintaj en la seka tera krusto, kaj la spiritoj de l'homoj fatamorganis kiel morto-fantomoj super la ĥaoso.

En plej profunda grundo, en la infero oni rakontis al si reciproke la suspensan, ekscitigan eventon pri la homoj, kiuj mem surprenis sur sin la sorton pri sia futuro. Kaj Homera ridado brudis alten ĝis la ĥoroj de la anĝeloj.

Tradukis kaj prezentis dum
la « Kultura periodo »

julio 1983

Hugo ROLLINGER

D 873 BAD KISSINGEN

Theresienstr. 23

	B1		G2	J3		M4	E5	Ŝ6	S7	F8		Ĥ9	U10	N11	L12	
V13	M13		Ŭ15	V16	B17	Ĥ18		L19	A20		Z21	K22	C23	Ŝ24	T25	N26
T27	B28	A29	R30		Z31	H32	D33		K34	N35	S36		Ĝ37	Ĥ38		R39
V40	M41	A42	E43	Ĵ44		R45	K46		B47	E48	H49	E50	A51	Ŭ52	S53	T54
	D55	Ŝ56	Z57	Ĉ58	J59	T60	H61	G62		F63		G64	Ĥ65	M66	Ŝ67	
V68	Ŭ69	Z70	A71		J72	K73		C74	J75	H76	N77		C78	Ĝ79	J80	A81
Ĉ82	G83		B84	N85	G86	Z87	Ĝ88	D89	J90	T91	N92		Ŭ93	Z94	P95	G96
L97		Ĉ98	U99		U100	E101	B102	C103	Ĵ104	L105	J106		K107	S108	G109	F110
Ĵ111	G112	F113	V114		U115	F116	Ĝ117		B118	V119	Ĥ120		C121	D122		H123
Ĉ114	Ŭ125	T126	P127	C128		A129	S130	Ĉ131	S132	E133	B134	S135	L136	Z137	C138	
Ĵ39	E140	F141		E142	Ĵ143	F144	V145	B146		H147	Ĉ148		Ŭ149	Z150	D151	Ĝ152
T153	Ĉ154	H155	R190	Ŝ157	Ŭ158	N159		R160	Ĵ162	L163	E164	D165	U166	D167	J168	
J169	K170	P171	C172		N173	Ĥ174	U175		P176	Ŝ177		Ŝ178	M179	U180	Ŝ181	
K182	H183	M184	D185	Ŭ186	L187	Ŝ188	Z189	R190	Ŝ191	E192	C193	F194	Ŭ195			

POR VIA DISTRO

TEKSITAJ VORTOJ

1 — Ĉiu horizontala sinsekvo de la malgranda kvadrataro ricevas la vorton, kies difino estas donita sur la sama linio.

2 — Ĉiu linio estas signita de litero, ĉiu kvadrato de nombro. Ĉiu litero de ĉiu vorto estas do signita samtempe de majuskla litero kaj nombro. Vi transskribas ĉiun literon en la responda kvadrato de la granda kvadrataro. Tiamaniere vi trovos du frazojn eltiritajn el tre grava esperanta verkaĵo.

A	Murmurinte aŭ kantinte kun preskaŭ fermita buŝo.....
B	Estis ies posedaĵo
C	Kuko, kies serĉo estas malkonsilinda, laŭ proverbo.....
Ĉ	En direkto al la libera aëro
D	Faladis neĝeroj
E	Malsincere
F	Ekzamenus
D	Sin glori per ecoj aŭ virtoj, kiujn oni ne posedas.....
Ĝ	En la proksimecon.....
H	Devige.....
ĥ	Traveturo de varoj tra lando, kiuj ne pagas limimpostojn.....
J	Tiuj, kiuj profesie akiras per pago de mono por iu firmo.....
ĵ	Elektraj unuoj
K	Rezignacie kaj kviete
L	Publike sciigas
M	Hastu !
N	Taŭga, praktika
P	Animalido.....
R	Konstante plenumi ies volon aŭ ordonojn.....
S	Kvalifikas iun romanon ĝenron
Ŝ	Puriginta
T	Aktorante.....
U	Kiel esprimiĝas tiu, kiu praktikadas unu el la belartoj
Ŭ	Trompadi
V	Pli-malpli disŝiritaj pecoj de teksaĵo.....
Z	Ili plenumas, profesie, publikan aŭ privatan servadon.....

42	81	29	129	71	51	20		
1	84	102	17	134	47	118	28	146
78	128	103	23	121	74	133	172	138
58	138	131	154	148	82	124	48	
55	139	89	167	33	165	151		
142	140	101	43	50	164	133	192	5
113	63	8	116	194	144	141	110	
48	83	2	64	96	103	62	142	86
79	152	88	117	37				
147	133	61	32	76	46			
9	120	65	38	183	18	162	174	
90	72	169	80	3	59	168	75	106
161	143	104	111	44				
107	22	123	73	182	34	170	44	
187	12	163	19	136	103	97		
66	41	184	14	4	179			
92	173	11	85	77	35	159	26	
176	122	127	95	171				
39	156	30	160	45	190			
7	53	108	130	132	135	36	177	
157	56	191	24	6	67	188	178	181
25	153	91	54	27	126	60		
100	175	180	10	115	166	99		
15	186	52	93	195	125	158	149	69
68	119	40	16	13	145	114		
94	21	137	57	150	31	189	70	87

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PLI - PLU

PLI esprimas KOMPARON kaj montras kvanton aŭ gradon superan al unu alia :

— li estas pli stulta ol malica.

PLU montras DAŬRADON DE stato aŭ ago :

— **pli longatempe** :


- li volis boksi plu, sed li ne povis.

— **pli malproksime** :

- iru unu paŝon plu.

RIM : kun nea vorto PLU montras ĉesigon de ago aŭ stato : ne plu ploru ; ne plu antaŭeniri.

Supereco de la maŝino :



Oni eksigis min. Deĵoro ne pli estas por mi en tiu oficejo. Mi, oni anstataŭigis per kalkulmaŝino, ne plu granda ol mia mano.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e - D ALICANTE - (1 100 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonsstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.